

Theodor Storm,

La urbo

tradukita de Richard Schulz

Ĉe griza strand', ĉe griza mar',
Jen kuŝas la urbet'.
Nebulo ondas trans digar',
Kaj muĝas tra l' silent' la mar'
Proksime de ' urbet'.

Susuras ne arbar'. Sen ĉes'
Ne kantas maje birda par'.
En nokt' autuna preter gres'
Kaj griza strand' kun kriagres'
Flugmigras anserar'.

Sed batas mia kor' por ci,
Ci griza urb' ĉe l' mar'.
La ĉarm' de la junec' por mi
Ridete brilas plu sur ci,
Ci griza urb' ĉe l' mar'.

...

Theodor Storm,

La urbo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉe l' griza strand', ĉe l' griza mar'
Situas la urbeto;
Nebulas sur la tegmentar',
La monotona bru de l' mar'
Aŭdiĝas tra l' kvieto.

Arbar' ne estas tie ĉi,
Ne kantas bird' sen ĉeso;
Anseroj nur, kun dura kri',
Forflugas alte preter ĝi,
Ĉe l' strando flirtas greso.

Sed pendas mia kor' de vi,
Vi griza urb' ĉe-mara;
De la juneco sorĉ-graci'
Ridante kuŝas super vi,
Vi griza urbo kara.

...

Theodor Storm,

Die Stadt

Am grauen Strand, am grauen Meer
Und seitab liegt die Stadt;
Der Nebel drückt die Dächer schwer
Und durch die Stille braust das Meer
Eintönig um die Stadt.

Es rauscht kein Wald, es schlägt im Mai
Kein Vogel ohn Unterlaß;
Die Wandergans mit hartem Schrei
Nur fliegt in Herbstesnacht vorbei,
Am Strande weht das Gras.

Doch hängt mein ganzes Herz and dir,
Du graue Stadt am Meer;
Der Jugend Zauber für und für
Ruht lächelnd doch auf dir, auf dir,
Du graue Stadt am Meer.

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Stadt” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

Arg-173-347 (2013-02-26 15:12:58)

La traduko estas - kun permeso de la eldoninto, sinjoro Hermann Behrmann, prenita el la libro “La muzino” de Rikardp Ŝulco (Richard Schulz), eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn’, Germanujo, en 1992. Ĝi troviĝas ankaŭ en la numero 6/1984 de la GEA-organo “Esperanto aktuell”. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Traduko de la Germana poemo “Die Stadt” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-03.*

Arg-173-346 (2004-02-22 12:54:29)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04).*

Arg-173-345 (2004-02-22 12:35:36)